

KANTARO POR KOMUNA KANTADO

KOMPILIS
ADAM WILKUS



PIANAKOMPANO
JADWIGA ŻEBROK

versio 1.0

ENHAVO

- Verda estas nia stelo
- [Vivu la stel'](#) (orig.kanto [Vive l'amour](#))
- [Vespere](#) (orig.kanto [Wszyscy Polacy](#))
- [Iris knabineto](#) (orig.kanto [Szła dziewczka do laseczka](#))
- [Que será, será](#) (orig.kanto [Que será, será](#))
- [Mariša kisu min](#) (orig.kanto [Mariša pusu daj](#))
- Dancu, dancu, movu vin (orig. kanto [Tancuj, tancuj, vykrúcaj](#))
- [Ho belulin' ĝis](#) (orig.kanto [O Bella ciao!](#))
- Guantanamera (orig.kanto [Guantanamera](#))
- Flosistoj (orig.kanto [Pieśń flisaków](#))
- Drinkis mi ruĝvinon nokte (orig.kanto [Vörös bort ittam az este](#))
- Trinkokanto (orig.kanto [Pije Kuba do Jakuba](#))
- Alaŭdeto (orig.kanto [Alouette](#))
- Mariana (orig.kanto [Marianna](#))
- Montano ĉu vi malĝoje? (orig.kanto [Góralu czy ci nie żal?](#))
- [Bravaj falkoj](#) (orig.kanto [Hej, sokoły](#))
- [Esperanto, la lingvo por ni](#)
- Iris Karolinjo (orig.kanto [Poszła Karolinka](#))
- Kia plezur' grimpis sur montojn ([Jak dobrze nam zdobywać góry](#))
- Adiaŭa kanto, [La iamo longe for](#) (orig.kanto [Auld Lang Syne, Pieśń pożegnalna](#))

KANTOTEKSTOJ

Verda estas nia stelo

Verda estas, verda estas nia stelo.
Homa amo, fratkompreno nia celo.

Al mondpaco la helpanto

Estas nia bela lingvo Esperanto. (2-foje)

Verda estas, verda estas nia stelo.
Interhoma amikeco - nia celo.

Ĉiu vera pacamanto

ŝatas nian belan lingvon - Esperanto. (2-foje)

Aŭtoro: Paŭlo BALKÁNYI

Vivu la stel' !

Plenigu la glason, ho ĉiu bonul' ,
Vivu la verda stel' !
Kaj kantu la homoj en ĉiu angul' ,
Vivu la verda stel' !

Refreno, 2-foje:

Ho, vivu la, vivu la, vivu la stel' ,
vivu la, vivu la, vivu la stel' ,
vivu la stel', vivu la stel' ,
vivu la verda stel' !

Plenigu la glason kaj tostu kun ni!
Vivu la verda stel' !
La lingvo kreita por ĉiu naci' ,
Vivu la verda stel' !

Refreno

Per voĉoj de nia kunbatalantar'
Vivu la verda stel' !
Resonu la voko sur tero kaj mar' ,
Vivu la verda stel' !

Refreno

Bazita sur tradicia usona kanto "Vive l'amour", kies tekston verkis Agnes B. Deans.

Vespere

Vespere, vespere, dum ĉe fajro sidas ni,
Silente kun vento flugas nia melodi',
Ĉar esperantistoj tutsamfamilias,
Juna ĉu olda plene harmonias,
Juna ĉu olda plene harmonias

Vespere, vespere, nia familia rond'
Murmuras la kanton, kun ni kantas tuta mond',
Ĉar esperantistoj tutsamfamilias,
Juna ĉu olda plene harmonias

Vespere, vespere, brilas fajro en arbar',
Ĉe fajro pli forte brilas via oklupar',
Ĉar esperantistoj tutsamfamilias,
Juna ĉu olda plene harmonias

Vespere, vespere, vigle batas nia kor'
Vesperoj ĉe fajroj longe restos en memor'
Ĉar esperantistoj tutsamfamilias,
Juna ĉu olda plene harmonias, Juna ĉu olda plene harmonias

Kantoteksto en Esperanto : Georgo Handzlik
Bazita sur la pollingva kanto „Wszystcy Polacy”.

Iris knabineto

Knabineto arbareton
iris kun la ĝoj, ha ha ha (2-foje)
iris kun la ĝoj.
la la la la la la la la
la la la la (2-foje)

Kaj renkontis ĉasisteton
sur la sama voj', ha ha ha (2-foje)
sur la sama voj'.
lalalala lalalala
la la la la (2-foje)

Ĉasisteto samvojano
mi salutas vin, ha ha ha (2-foje)
mi salutas vin.
la la la la la la la la
la la la la (2-foje)

Vi ricevus buterpanon
sed mi manĝis ĝin, ha ha ha (2-foje)
sed mi manĝis.

lalalala lalalala
la ia la la (2-foje)

Se vi manĝis, do vi manĝis
ne incitu min, ha ha ha (2-foje)
ne incitu min.
lalalala lalalala
lalalala (2-foje)

Se mi havus bastoneton
do mi batus vin, ha ha ha (2-foje)
do mi batus vin.
la la la la la la la la
la la la la (2-foje)

El la pola popolkanto „Szła dziewczeczka do laseczka” tradukis Roman Dobrzyński.

Que será, será

Demandis mi en infanaĝ'
Pri de l' estonto mistera

Pri de l' estonto mistera paĝ',
Ĉu feliĉigos la vivo min,
Respondis la patrin':

Refreno:

“Qué será, será...”
Per nekomprenebla vort'
Parolas venonta sort',
“Qué será, será...”

Kaj same mia amatin'
Respondis pere de tiu kant',
Dum mi varmege certigis ŝin
Esti fidelamant'.

refreno

Nuntempe kun grandega pet'
Demandas same mia filet',
Kaj mi respondas simple al li
Per tiu melodi':

refreno

Tiel ĝis la mort'...

Aŭtoro de la origina teksto Jay LIVINGSTON

Mariŝa kisu min

Ĉiuj knaboj kaj knabinoj amas sin,
nur neniu junuleto amas min.

Refreno:

Mariŝa kisu min,
sen peto al patrin' ,
ŝi juna same faris,
pri kisoj ne avaris.

Batas panjo, batas panjo, batas min,
se mi amas, se mi kisas knabo, vin.

refreno

Sidas panjo, sidas panjo sur kortet' ,
dum mi estas en kamero kun knabet' .

refreno

Traduko de ĉeĥoslovaka kanto al Esperanto: Ladislav KYSELÝ

Dancu, dancu, movu vin

Dancu, dancu, movu vin, movu vin,
Preter forno ŝovu vin, ŝovu vin,
Ĉe malvarmo multe pli, multe pli
Ol kusenoj servas ĝi servas ĝi.

Refreno:

Tra la, la la, tra la, la la
la la, la la, la la la, la la la

Ĉe kazerno gardis mi, gardis mi,
Truan jakon havis mi, havis mi,
Nokta pluvo rosis min, rosis min,
Ĝis mateno frostis mi, forstis mi.

Refreno

Iun matenon vekiĝis mi
Ho! Belulin', belulin', belulin', ĝis, ĝis
Iun matenon vekiĝis mi
Kaj tie estis malamik'

Traduko de vortoj de slovaka popolkanto: Tomáš PUMPR

Ho belulin' ĝis

Ho! Partizano forportu min
Ho! Belulin', belulin', belulin', ĝis, ĝis
Ho! Partizano forportu min
Ĉar mi estas ĉe la mort'

Kaj sen mi mortos kiel partizano
Ho! Belulin', belulin', belulin', ĝis, ĝis
Kaj se mi mortos kiel partizano
Vi devos entombigi min

Mia tombo estu sur la montaro
Ho! Belulin', belulin', belulin', ĝis, ĝis
Mia tombo estu sur la montaro
Ĉe la ombro de floreg'

Kaj la popolo tien ironta
Ho! Belulin', belulin', belulin', ĝis, ĝis
Kaj la popolo tien ironta
Certe diros: "Bela flor'!"

Jen estas floro de partizano
Ho! Belulin', belulin', belulin', ĝis, ĝis
Jen estas floro de partizano
Mortis li por liberec'

El la itala tradukis Renato Corsetti.

Guantanamera (popolkanto el Kubo)

De kie kreskas la palmoj,
Mi venas, homo sincera, (2x)
Por kanti simplajn korkantojn
Al nia mondo mizera.

Ref.: Guantanamera, guajira guantanamera,
Guantanamera, guajira guantanamera.

La kantoj spiras helverdon
Kaj spiras ardan brulruĝon, (2x)
Kaj kiel cervo vundita
En montoj serĉas rifuĝon.

Ref.: ...

Mi disdividas la sorton
Kun la mizera homaro, (2x)
Ĉar tiu monta torento
Ĝojigas min pli ol maro.

Ref.: ...

Flosistoj (pola popolkanto)

Malrapide flosas barko
sur ondoj de l'river',
preter urboj sub pontarkoj,
tra nia bela ter'.

Dum nokto kaj dum tag'
ne lasas nin la kant',
vivas sen la kant' neniu
ĉe ni rivervagant'.

Fluas, fluas la flosaro,
post horo pasas hor',
jam proksime al la maro,
sed hejme restis kor'.

Atendas la knabin',
reveni vokas tuj
apud bela urb' Krakovo,
en koro de l'patruj'.

El la pola tradukis Roman Dobrzyński.

Drinkis mi ruĝvinon nokte

Drinkis mi ruĝvinon nokte,
anĝelin', mia stel', kolombo.
Iĝis ebria mi tute,
anĝelin', mia stel', kolombo.
Piede mi ŝanceliĝe staras,
Tamen knabinoj min amas,
anĝelin', mia stel', kolombo.

Oni diras, mi malsanas,
anĝelin', mia stel', kolombo.
Brula kandle mi velkas,
anĝelin', mia stel', kolombo.
Koro mia tre doloras,
Zorgi pri mi nur vi povas,
anĝelin', mia stel', kolombo.

Tri husaroj en la ĉardo,
anĝelin', mia stel', kolombo.
Drinkas vinon en ĉagreno,
anĝelin', mia stel', kolombo.
En la mano botel' plenas,

Knabin' en la sino nestas,
anĝelin', mia stel', kolombo.

Traduko de vortoj de la hungara popolkanto: Antono Samak

Trinkokanto

Je la sano de Johano drinkas Floriano.
Unu estas jam ebria, vomas la alia.
Forte tenu kalikon kaj ne timu efikon.
Drinku, drinku kara frato ĝis ebria stato.

Traduko de vortoj de la pola kanto „Pije Kuba do Jakuba”: Tadeusz Pleskaczyński.

Alaŭdeto

Alaŭdeto, bela alaŭdeto,
alaŭdeto, senplumigu nun.
Sen plum' estos via kap',
sen plum' estos via kap',
jes la kap', jes la kap',
kaj la..., kaj la...
Hooo, alaŭdeto...

Sen plum' estos via bek'
sen plum' estos via kol'
sen plum' estos via naz'
sen plum' estos la orel'
sen plum' estos via Brust'
sen plum' estos via dors'
sen plum' estos via krur'
sen plum' estos la postaj'
sen plum' estos la pied'
sen plum' estos via vost'.

(La kanada popolkanto)

Mariana

Estis, estis bela maja nokto,
Mariana volis veni
al nia rendevu'...

Refreno

Ho, Mariana, dolĉa, eta Mariana,
atendos mi nun vin ĝis frumaten'.

Pasis, jam la nokta mezo,
Mariana ne alvenis
al nia rendevu'.

Refreno

Vane, floras majaj floroj,
Mariana ne alvenis
al nia rendevu'.

Refreno

Laŭ KantarViki teksto\muziko Luko Paljetak, traduko al Esperanto
Z. Rehorić tamen la kanton en la pola unue kantis Bogusław Mec.

Montano, ĉu vi malĝoje

Montano, ĉu vi malĝoje
Forlasas landon ŝatatan
Pentrindan hejmon ĉi foje
Eĉ familion amatan.

Ref.: Malĝojas via nun kor'
Montan' ne iru do for.

Montano rigardas kapjese
Montaron ploras konfese
Sinjor' mi devas foriri
Fremdloke panon akiri.

Ref.: Adiaŭ diras nun vi
Revenu baldaŭ al ni.

La kanto estis komponita por la poemo de krakova poeto Michał
Bałucki, kies kunulo en malliberejo estis altmontarano sopiranta
sian patrujon.

Esperanto, la lingvo por ni

Sur montoj kaj step' indianoj
ĉasadas kun ruĝfamili'.
Kaj se vi postulas parolon,
kanjono respondas per kri':

Ref.: Esperanto estas la lingvo por ni, por ni,
Esperanto estas la lingvo por ni.

En densa Afrika ĝangalo
sovaĝaj nigruloj sen Di'
jam solvis la lingvan problemon,
per tam-tam' disiĝas la kri':

Ref.: ...

Ĉe norda poluso eskimoj
Loĝadas en neĝo glaci`
Kaj kiam parolo necesas
Trans blanka dezert` sonas kri`

Ref.: ...

Sur tuta ĉi vasta terглоbo,
en urboj de ĉiu naci'
troviĝas la samideanoj,
soniĝas la tutsama kri':

Ref.: ...

Indianoj, eskimoj, nigruloj,
urbanoj, kaj buboj, kaj ni
jam uzas la Zamenhof-lingvon,
do vivu, prosperu la kri':

Ref.: ...

Iris Karolinjo

Iris Karolinjo for al Gogolin'. (2x)

Sekvis ŝin Karleto, elegantuleto,
kun botel' da vin'. (2x)

For al Gogolino iris Karulin'. (2x)

Volis ŝi rapidi, fraŭlon plu ne vidi,
sed li vokis ŝin. (2x)

Hejmen vi revenu, ho, karulinet'. (2x)

Tion mi ne volos, vi min ne konsolos,
vanas via pet'. (2x)

Lasu min, Karleto, ne postkuru min (2x)

mi plurfoje diris, ke mi ne deziris
nek deziros vin. (2x)

Gvidu min, vojeto, al la vasta mond' (2x)

mi aliun trovos, li min ami povos
por malbon' kaj bon'." (2x)

Kia plezur' grimpi sur montojn

Kia plezur' grimpi sur montojn,

Enspiri venton ĝis la sin'

Peli nubojn ĝis horizonto,

Dum fingron vundas tatra pint'.

En la orel' torenta kant'

Dum en la vejno varma sang' (pulsas sang')

En arbar', en la mont'

Vivu do plene ni,

Kiel vent' pasas temp'

Iam nin forgesos vi.

Kia plezur' dum nokto estas
Vagi laŭ hela vojo for,
Dum steloj lume nin arĝentas
Atendi, kion donas sort'.

Adiaŭa kanto

Ĉu ni disiru sen esper'
Sen esper' al reven',
Ĉu ni disiru: sen esper':
Al nova rekunven'?

Rekantaĵo:

Nur estas ĝis revido, frat',
Nur estas ĝis revid'.
Ni certe rekunvenos, frat',
Nur estas ĝis revid'.

Fermiĝu per la manoj nun
Sub nia verda stel',
Fermiĝu per la manoj nun
De l' am' la bela ĉen'.

Rekantaĵo

Ĉar vivos nia ideal'
Ja en la estontec',
Ĉar vivos nia ideal'
En vera amikec'.

Rekantaĵo

La Iamo Longe For

1. La prakonatojn ĉu ni lasu
Velki el memor'?
Ĉu ni ne pensu kare pri
La iamo longe for?

(Rekantaĵo post ĉiu strofo)

Iamo longe for, karul',
Iamo longe for, karul'!
Ni trinku en konkordo pro
La iamo longe for!

2. La kruĉojn do ni levu kaj
Salutu el la kor',
Kaj trinku en konkordo pro
La iamo longe for!
3. Montete iam kuris ni
Kaj ĉerpis el la flor'
Sed penan vojon spuris ni
Post iamo longe for.
4. Geknabe ni en fluo vadis
Ĝis vespera hor'
Sed maroj muĝis inter ni
Post iamo longe for.
5. Do jen la mano, kamarad'!
Ni premu kun fervor',
Kaj trinku ni profunde pro
La iamo longe for!

Orig. tekston bazitan sur la skota kanto Auld Lang Syne = Pasintaj Tagoj, Tempo pasintaj aŭ Antaŭ longa tempo, verkitan de Robert Burns, tradukis al Esperanto Reto Rossetti. En kelkaj landoj ĝi estas la tradicia himno de la Novjariĝo. Tamen, en Pollando konata kiel la adiaŭa kanto.